Vi telefonis

Vortoj kaj muziko de
Ĵomart Amzeev

Vi telefonis kaj silentis longe.
Mi sciis ĝuste telefonis vi.
Kaj mi atendis en la nokta mondo
konatan voĉon el pasintjuli'

Rf – I: Sed vi silentis kaj mi trovis vortojn,
kiujn komprenis kaj atendis vi.
Vi diris nur: "Mi plu ne havas fortojn"
Kaj mi respondis: "Baldaŭ venos mi".

Apudas vi, mi aŭdas vian spiron.
Sed kion fari estas inter ni
longa linio de tripunkt' sopira
kaj de eraroj de ofendlini'.

Rf – II: Aŭskultas nin eĉ nokto tre atente
kaj volus helpi telefonistin'.
Vi diris simple: "Ĉiam vin atendas".
Kaj mi respondis: "Baldaŭ, amatin"'.